

LA VERDA LUPEO

74-a Jaro



9(88) INFORMILO DE ELF-AREK marto 1992

Offizielles Organ der ArGe ESPERANTO im BdPh e.V.

Kongresa Karto № 1214

DRESDEN 1908

16an-22an de Aŭg.

IV. INTERNACIA ESPERANTISTA KONGRESO.

por: Fino Frieda Paithel, Chemnitz

La Kvaro por la Kvara.

La kasisto:

Presejo: L. Emil Boden Dresden, Bismarckpl. 12.

Kongreskarto kaj bildkarto de la 4-a Universala Kongreso 1908 en Dresden (Germanujo).
Inter la multaj subskriboj, ankaŭ dorsflanke de la bildkarto troviĝas subskribo de d-ro Zamenhof.

El arkivoj de Esperantistoj

Venu Dresdenon
Koran bonvenon.

IV. Internacia Esperantista Kongreso
16.–22. Aŭgusto 1908.

NI PRI NI



Dankon de la redaktoro...

Pro ricevitaj bondeziroj kaj pro LVL-kontribuaĵoj koran dankon al: ges-roj: Anna-Greta Strönne, Terttu Österman, Elda Dörfler, Paulsson, Hirsch, Heimlich, Kronshage, Ĉin Kajĝi, Zhang Linrui, Cao Xionglin, Gao Zhen, Koralo, Zamenhofido (?), Belluci, Hasala, Bielak, Drucker, Lopez, Vana, Amouroux, Fekete, Sadier, Vulfovič!

K o t i z o j

Sadier: "...Kiel pagi la kotizon 1992 por eviti deprenon de la banko, kiel okazas en Svedio kaj Nederlando (kaj en aliaj landoj). Ĉu ankaŭ en Germanio la poŝta banko deprenas de la internaciaj ĝiroj?"
Respondo: Tiurilate artikoleto troviĝis en mia manuskripto por LVL 87, sed ial "elfalis". Ankaŭ mi opinias tiun problemon tre grava. Sed mi, redaktoro, tute ne havas solvon.

NIAJ MORTINTOJ



Forpasis el niaj vicoj:

Ihsan Zulifkary
Alois Wenclewski
Dick Goslinga

Dum jardekoj ili estis niaj proksimaj amikoj kaj aktivaj kolektantoj kun grandaj kolektoj. Ni sincere kondolencas al la familioj de niaj forpasintaj amikoj.

STAMPOBANKO




Nia stampobanko informas:

Okaze de la 44-a IFEF-kongreso en Münster (FRG) estos uzata E-stampo (vd. sub stampoj). Jam nun haveblas specialaj pk kaj kov ĉe la stampobanko. Prezo por 3 neuzitaj pecoj DM 2,50 aŭ 1,5 IRK. Kun la speciala stampo ili poste estos haveblaj kontraŭ DM 2,-- por pk kaj DM 2,50 por kov.
El la granda stoko de E-sta jen speciala oferto:

100 diversaj ĉinaj sta: 50 IRK
50 diversaj hungaraj sta: 40 IRK
kaj 50 diversaj polaj sta: 40 IRK

NI EN EKSPOZICIOJ



Koralo - Ekspozicio

Kiel certe konata, nia ĉina KORALO nun loĝas en sudĉina provinco. Li informis, ke li partoprenis "Rondiran 3-urban Fila-Ekspozicion", 05 - 30 10 1991, kun sia ekspozaĵo "Esperanto-Internacia Helpa Lingvo". Sur la kunsendita ekspo-kov mi trovis surpresitan

Eltranĉaĵo el la koverto
kun la priskribita stampo.



ĉinan stampon, ne E-an. Ankaŭ tiu ne konformas al valida poŝta regularo. Mia demando: kial perfektaj ĉinaj filatelistoj iniciatas stampojn, kiuj laŭ poŝta normo ne estas validaj..?, sed mi certas, ke ili bone konservas tiujn filatelaĵojn kontraŭnormajn. Saluton al vi. Ĉu vi akiris medalon? Eble skribu vian opinion pri "poŝteco" de la ekspo-stampo!

Piton en la brazila BRAPEX VIIIa

Kometsimile aperis nia nova kluba amiko Piton en nia "ELF-AREK-a Ĉielo". Kun novaj ekscioj kaj granda filatela kapablo. Laste li partoprenis kun sia ekspozaĵo "Babelo estu detruita" en la VIII-a BRAPEX, brazila nacia filatela ekspozicio, kiu okazas ĉiun trian jaron (ĉifoje en la urbo Vitoria). Li akiris la medalon "Granda Arĝento" kaj specialan premion de la ĵurio. Por kompili la ekspozaĵon Piton bezonis pli ol 2 jarojn. Akiri per la "unua salto" tuj grandan arĝenton, tio vere meritas admiron,. sed ankaŭ miron, ĉar ekzemple en Germanujo oni ne povas tuj partopreni en nacia ekspozicio. Ekzistas 3 kategorioj: Lokaj ekspozicioj (rango 3), regionaj ekspozicioj (rango 2) kaj naciaj ekspozicioj (rango 1). Nur per gajno de certa kvanto de vermajlaj aŭ oraj medaloj oni rajtas partopreni en la venonta rango. La rango 1 inkluzivas ankaŭ la rajton partopreni ekspoziciojn eksterlande.
Do, gratulon al vi, ni ĝojas kun vi pri la brila rezulto.

Belluci en Toskanio kaj Abrucoj

Arĝentumitajn bronco-medalojn ricevis nia Belluci en regionaj ekspozicioj de la italaj regionoj Toskanio kaj Abrucoj por siaj E-filatelaj ekspozaĵoj. Koran gratulon al vi kaj dankon pro la informo.

Fekete kaj Podani en Budapeŝto

En decembro 1991 okazis en Budapeŝto parafilatela ekspozicio. Partoprenis Podani (laŭ la membrolisto ne ELF-AREK'ano?) per E-filatela ekspozaĵo kaj nia Johano Fekete per E-bildkarta kolekto. Podani akiris arĝentan medalon, nia Fekete partoprenis eksterkonkure, ĉar li estas estrarano kaj ricevis kristalan vazon. Gratulon!

Donaco al la Kalocsai-muzeo



Dum la Baghy-Kalocsay-Festo de Hungara E-Asocio, nia Fekete donace transdonis por la Kalocsay-muzeo ekspozaĵon. Tiun donacon la ĝenerala sekretario de HEA, Sandor Jakab, transdonis al la urbestro de Abaujszanto por ekspozicii ĝin en la Kalocsay-muzeo. La ekspozaĵo konsistas el 14 folioj kun po du Kalocsay-filatelaĵoj.

(Foto: Fekete kun la direktorino de la muzeo)

CETERAĴOJ

Abundo da E-aĵoj en Parizo

Nia Anton Kronshage sciigis pri vizito de foiro "PHILATELIA 91". Laŭ li, pariza komercisto, proponis pli-ol-trimil-pecan stokon da kov/pk E-aj. Plejparte el postlasaĵo de nia iama membro Jean Chapellier (unu el niaj karaj pioniroj de E-filatelio!). Kronshage sciigis la adreson de la komercisto, sed mi ne emas momente ĝin popularigi, ĉar ni havas nian stampobankon kun samabunda materialo . Kaj kial ni senpage faru propagandon por iu ne E-a entrepreno? Tamen koran dankon pro la informo kaj saluton al nia Kronshage.

Pri OMO

Nia Piton atentigis pri tio, ke OMO estas notita en la "Gvidlibro por Supera Ekzameno" (red. Alfonso Pechan, eld. de HEA 1979) sur paĝo 34: "1927 - V. Vengerov - OMO (lingvoplano miksa)". Dankon pro la informo! Ĝi instigis min, pli atente trafoliumi tiun tre utilan libron! (vd. ankaŭ: "Bibliografion de la Internacia Lingvo")


E-medalo el La Laguna

Nia Amouroux sciigis, ke okaze de la pasintjara hispana E-kongreso, la urba estraro de La Laguna (Tenerifo-Kanariaj Insuloj) faris sufiĉe pezan, metalan E-medalon. Unu flanko montras Z-portreton, la alia la urban blazonon. Dankon pro la informo.






STAMPOJ



BR 20 uzita jam 15 12 1959


Nia kluba amiko James Rezende Piton sendis al nia Hirsch leteron kun multaj interesaj faktoj, i.a. ankaŭ pri nia BR 20! Piton posedas tiun stampon en sia kolekto sur registrite sendita sendaĵo kun la registro-pruvilo. Tiu ĉi pruvilo kaj la koverto posedas nuligan datstampon de 15 12 1959.[A)] Dorsflanke de la koverto troviĝas ankaŭ alvenstampo. Dankon al Piton pro tiu korekta informo! Niaj stampo-katalogoj, ĝisnunaj, kompreneble povas peri nur ĝisdate ricevitajn informojn. Laŭ mia scio tiu ĉi Piton-a sciigo estas la unua ricevita pri BR 20 kun korekta pruvaĵo. Estu fiera pri via posedaĵo, nepre ĝi estas granda raraĵo, ĉar ŝajne neniu el niaj klubaj geamikoj posedas tiun pecon, aperintan jam antaŭ 30 jaroj!



BR 20 kun la dato: 15 12 1959

La lastaj ĉinaj stampoj de 1991 (??)

Nia estimata klubamiko Gao Zhen-Xing sendis ampleksan leteron kun tiu ĉi E-stampo. Lige kun ĝi li informis: "...Jen nova E-memorkoverto. Kiam post laboro mi venis al poŝtoficejo, tiu ĉi koverto jam elvendiĝis. De mia amiko mi ricevis kelkajn, hastis




al la poŝtoficejo, sed malfruiĝis kaj nur sukcesis akiri normalan datstampon. (La unua de oktobro estas ĉe ni nacia festotago kaj la poŝtejo finas pli frue labori.) La kaverno pri ĉina mito estas subtera kaverno kun multaj mirindaj vidaĵoj, faritaj pri rakontoj el ĉina antikvaj mitoj. Ĉar la dato de la finkonstruo prokrastiĝis kaj la E-stampo kun la dato: 1991.9.24 jam estis presita sur la koverto, la pm-kompanio faris ruĝan rektangulan sta kun la teksto: dato de finkonstruo prokrastiĝis al 1a de oktobro. 1)
Desegnis la koverton kaj la stampon: Shi Peng kaj Li Xue-hua.

Eldonita de la Qingdao pm-Kompanio kun la numero 58. Eldonkvanto ne notita..." Dankon pro la detalaj priskriboj. Bv. informi, ĉu krom la surpresita stampo, ekzistas ankaŭ surstampita (mane!) stampo. Vi ne informis pri tio. Krome vi skribis, ke temas pri "E-a memorkoverto", sed krom la surpresita E-stampo mi ne trovis E-an tekston sur ĝi?. Dankon al vi!

TJ 1991-52: Tao Xingzhi, Beijing

Okaze de la 100-a datreveno de la naskiĝo de Tao Xingzhi, fama ĉina edukisto, la ĉina MPT emisiis 1991 10 18 pm-serion J. 183 (2 pm) kun nominalo de 20 kaj 50 fenoj. Aperis apud oficiala UTK kun stampo ankaŭ E-lingva unuataga nuliga stampo. Uzis ĝin la Pekina Okcident-distrikta pm-Kompanio. Proponis ĝin nia ĈKG kaj desegnis ĝin ZLR.



La stampo tekstas: LA 100-A DATREVENO DE LA NASKIĜO DE TAO XINGZHI kaj portreto de li. La ideogramoj apud la portreto en la sta kaj sur la UTK signifas: "La Mondo Plena de Amo". La surkovertaj ideogramoj fontas el la plumo de Tao, do estas aŭtografiaĵoj. Dankon al nia ĈKG pro abundaj informoj pri la UTK! (vd. ankaŭ sub: "E-istoj kaj simpatiantoj en filatelio")
La supra bildo montras registrite senditan UTK kun dorsflanka alvenstampo kaj kun la E-lingva unuataga stampo de la Pekina Okcident-distrikta pm-Kompanio.

TJ 1991-53: Xu Xiangqian, Haikou



Sendis ĝin al mi nia Zhang Linrui, grafikisto de tiu poŝta stampo el Haikou, kiu posedas E-stelon kun la dato: 1991-11-8 Supozeble temas pri unuataga stampo por emisio de 2-peca pm-serio J. 184 pri Xu Xiangqian. La stampo posedas la ĉinan tekston: LA 90 JAROJ DE LA NASKIĜO DE XU XIANGQIAN. Tute sube en la sta pozas la E-stelo. Desegnis: Zhang Linrui. Sendis: Linrui. Informis: Kajĝi. Dankon al ambaŭ!

TJ 1991-54: Virina Piedpilko, Haikou

Sendis. informis kaj desegnis: Zhang Linrui. Dato: 1991.11.08. Loko: Haikou, pm-Kompanio. La stampo montras i.a. virinan kapon kaj piedpilkon kun E-stelo en sia mezo. Ĉin-kaj E-lingva tekstoj en ĝi: La 1-A MONDA VIRINA PIEDPILKA ĈAMPIONECA KUNKURSO (anstataŭ: KONKURSO). Linrui faris ankaŭ malgrandan kvanton da privataj kovertoj kun la sama teksto. Dankon pro la informo




FIFA estas la Internacia Piedpilka Asocio (Fédération Internationale de Football Association), fondita 1904, nuna sidejo: Zürich (CH)

TJ 1991-55: Virina Piedpilko, Jiangmen

La unua virina piedpilka ĉampioneco de FIFA (klarigo vd. supre) okazis la 16-an ĝis 30-an de novembro 1991 en pluraj urboj de la ĉina Guangdong-a provinco, i.a. ankaŭ en Jiangmen. La Jiangmena Poŝta-Telekomunika-Oficejo aperigis lige kun tiu stampo ankaŭ sennominalan poŝtkarton E-an. Ambaŭ desegnis: Xie Shaoxing. Eldonkvanto de la pk: 1000 ekzempleroj. Presis ĝin Jiangmena E-Ligo kaj Jiangmena Filatela Asocio.

Poŝte sendita E-a pk kun la ornama E-a apudstampo. Dorsflanke alvenstampo de: Pekino 44



La sta posedas i.a. la E-an tekston: LA I-A MONDA VIRINA PIEDPILKA ĈAMPIONECA KONKURSO POR "M&M´s POKALO DE FIFA kaj la daton: JIANGMEN 1991.11.16-30. Sur la pk mi trovis samteman pm el du-peca serio J. 185. Koran dankon al Ĉin Kajĝi pro alsendo de informoj kaj pk.

TJ 1991-56: Ĉe Akvobordo, Haikou



Libroforma estas tiu poŝta E-stampo el Haikou kun la dato: 1991.11.19 kaj kun la E-a teksto ĈE LA AKVOBORDO. Temas pri en Ĉinio fama antikva romano.

Desegnis: Zhang Linrui. Sendis kaj informis: La sama. Dankon kaj koran saluton al vi!



TJ 1991-57: Chen Ji (vd. 39-42)!)

Nia Cao Xinglin reaúdigis sin al mi, li estas eksterhejme, en Peking, kaj perfektigas siajn lingvospertojn E-ajn. Li aldonis du stampojn kaj skribis, ke ilin eldonis la Nangchang-a pm-Kompanio. Unu el ili estas la al ni jam konata NJEA-stampo, la dua denove eksternorma stampo, al ni nekutima formo (vd. la bildon). La teksto en la stampo: LA 90-A DATREVENO DE LA NASKIĜO DE K-DO CHENYI. La dato: 1991.8.26. Iomete la formo provokas imagon pri pinarba Bonsai-pleto. Estus ja interese scii la nomon de la grafikisto kaj kiujn ideojn li ligas en tiun grafikaĵon.

TJ 1991-58: 2a Ĉina E-Kongreso



Senkomente atingis min du novjaroj kartoj de Cao kaj de Peng Jianjun. Ambaú posedis ŝajne poŝtan (apud-)stampon kun la dato: 1991 12 30. La teksto: LA 2-A ĈINA KONGRESO DE ESPERANTO. En la stampo: E-flago. Certe venos suplementaj informoj poste. Dankon al ambaú.

Linrui - respondoj

TJ 1991-35 kaj -46 estas poŝtaj, -35 montras mapon pri la Hainan-provinco, -36 desegnis: Linrui, -47 desegnis: Zhang Linrui (samtage aperis samtema pm-serio). Nia vere tre aktiva klubano Linrui respondis, ke Haikou emisias ankaú ne-Esperantajn stampojn. Li opinias, ke TJ 1991-23 kaj -24 ne konformas al la poŝta regularo. Sed tio ja validas ankaú por deko de aliaj ĉinaj stampoj, katalogitaj en nia kaj en la ĉina sta-katalogoj (nun aperinta). Koran dankon al vi, kara Linrui pro la senditaj informoj kaj via sendaĵo de 22 11 1991.

E-33-1: 51-a Nacia Kongreso, La Laguna (Tenerifo, Kanariaj Insuloj)









Niaj Allessandro Bellucci kaj Jean Amouroux dokumentis per senditaj kopioj la ekziston de tiu sms, uzitan okaze de la 51-a hispana E-Kongreso. Trovitaj datoj (ĝis nun): 14.6. kaj 13.7.. Poŝtejo: La Laguna-Tenerife. La bildo montras maldekstre turon kaj meze la kongresan emblemon. Ambaŭ estas troveblaj ankaŭ sur la bildkarto pri la kongreso. Dankon al ambaŭ.
Rimarko: Ekzistas ankaŭ ronda speciala stampo kun la sama desegnaĵo kiel la varbkliŝo de la sms, publikigita en LVL 7(86), paĝo 18 kaj en LVL 8(87), paĝo 10. Tiu ronda stampo ricevis la numeron 33-2 kaj la sms 33-1.

PL 136: Bilaterala Filatela Ekspozicio Israelo-Pollando

Nia klubamiko Stefan Bielak per letero kun fotokopio de 4.11.1991 sciigis pri nova pola E-stampo: Poŝtoficejo WARSZAWA 1 uzis 18 09 1991 pol-lingvan stampilon kun Zamenhof-portreto. Jen la tradukita teksto: Bilaterala Ekspozicio Filatela Israelo-Pollando. Apud la Zamenhof portreto: LUDWIK ZAMENHOF 1859 - 1917 kaj: kvinpinta stelo. Bielak informis, ke la stampo troviĝas sur pola tutaĵo (pk kun nominalo de 2,00 złotoj kun bildo de Kochanowski) kun la aldona afranko de mil złotoj pro tarifa altigo. La pk ricevis privatan surpreson kun portreto de Zamenhof kaj kun la teksto: ZAMENHOF AŬTORO DE ESPERANTO:




Dankon pro la sendita informo kaj koran saluton al vi!

Rimarko de Hirsch: Kun granda bedaŭro mi ne povis publikigi la poŝtkarton, ĉar la sendita fotokopio preskaŭ nenion montras. Tial la peto: bv. estonte, se vi informas pri novaĵoj, ne sendu fotokopiojn, sed, se iel eble, 2 originalojn, unu por la redaktoro de LVL kaj unu por mi, por katalogi la novaĵon. Fari fotokopion de jam malbona fotokopio neniam sukcesas.

AFRANKSTAMPOJ







Ekde 14 10 1991 la sekretariejo de la Ĉeĥa E-Asocio, Praha, uzas afrankmaŝinon POSTALIA, kiu en la varbkliŝo posedas en ĉeĥa lingvo (tradukitan!) tekston: ĈEĤA ESPERANTO ASOCIO kun ĝia adreso. Desegnis: Karl Kuĉa. Gravuris: Karel Pavliĉek.

AF E-Klubo, Strażnice (CSFR)


Ekde 06 12 1991 en la kulturdomo de la ĉeña Straźnice funkcias afrankmaŝino POSTALIA. La tekstoparto (varbkliŝo) posedas la ĉeñ-lingvan (tradukitan)tekston: KULTURA DOMO STRAŻNIĈAN/ESPERANTO KLUBO....
Atentigo de Hirsch: en la varbkliŝo de la supre menciita AF-stampo la domo estas kun kadro. Mi havas la saman, sed sen kadro. La datoj: 9.8.1991 kaj 6.12.1991. Klarigo de tiu afero sekvos en la venonta LVL.



















AF E-Klubo Brno

Ekde de 06 12 1991 en poŝtoficejo de Straźnice ekfunkciis afrank-maŝino kun la tp "UNUA SOCIETO DE ESPERANTISTOJ BRNO 1901 - 1991"
Ĉiujn informojn pri la novaj AF peris al mi nia Hasala, kiu tiujn ankaŭ iniciatis. Ili haveblas en nia stampobanko. Dankon al vi!
Demando: Ĉu vi denove "pruntis" kliŝojn al Trebiĉ?







POŜTMARKOJ

P r i m a l n o v a j b r a z i l a j p m.

Pm "Ora Jubileo de E" 1937, Mi-Nr. 471, Yvert-Nr.333, BM-Nr.24

Nia Piton skribis al Hirsch i.a.: "...Mi aĉetis du provpresaĵojn de tiu ĉi E-pm. Ambaŭ estas sendentaj kaj presitaj sur senguma kartona papero. Unu el ili posedas definitivan verdan koloron, la alia estas bruna..."

Pm "Deka brazlia E-kongreso", 1945, Mi-Nr.666, AP 667, Yvert-Nr. 423, A 47, BM-Nr. 30+31.

Nia Drucker skribis al mi longan leteron (koran dankon al vi!)

kaj informis i.a.: "...Mi posedas ambaû nedentumitajn (BM 30+31). Tiun de 40 centavoj en senfiligrana 4-bloko kaj tiun de 1,20 Crs. kun filigrano kaj granda marĝeno. Tiu lasta ankaû ekzistas sen filigrano. La plej populara brazila pm-katalogo "RHM" registras nedentumita tiun de 1,20 Crs. Mankas en ĝi ankau la sendenta E-pm de la 66-a UK.

ESPERANTISTOJ KAJ SIMPATIANTOJ EN FILATELIO

Max Müller

Hazardo, ke mi nun loĝas en "Max-Müller-Strato". Nia Amouroux atentigis min, ke tiu homo estis eminenta amiko de Esperanto. Sed: bedaûrinde ne ĉiuj Max Müller estas tiu M.M., kiun celas Amouroux. "Mia" estis komunisto kaj tial "oni" baldaû donos alian stratnomon, momente tre ŝatata hobio ĉi tie. Sed nun pri "nia" M.M.



"...Müller, Max, germana lingvisto, universitata profesoro en Oksfordo. Naskita 1823 en Dessau, mortis 1900 en Oksfordo. Plurfoje montris siajn simpatiojn por Esperanto kaj skribis en 1894, ke Esperanto havas la plej altan lokon inter siaj konkurantoj.
Müller per vico da komparoj venis al la konkludo, ke la bazaj prakomencaj elementoj, sur kies fundamento elkreskis ĉiuj modernaj lingvoj estis 120 sonkunmetaĵoj-radikoj, ĉiuj proksime ligitaj al la primitivaj labor-manieroj kaj agoj.."
Jen resumo el EdE kaj la Drezen-a "Historio de la Mond-lingvo". Amouroux sciigis, ke julie 1974 la hinda poŝto eldonis 1-rupian portretan pm pri M.M..

Papo Johano Paûlo IIa parolis Esperanton

Jam pluraj papoj pledis por Esperanto. 14an kaj 15an de aûgusto 1991 unuafoje okazis, ke papo antaû publiko parolis en Esperanto.



En Ĉenstoĥova (PL) okazis la 6-a Monda Junularo Tago (de Katolikoj?) kun pli ol miliono da parto-prenantoj. En sia salutparolado kaj en sia ferma parolado la papo en multaj lingvoj, ankaû en Esperanto diris:
"Mi donas ankaû en Esperanto bonvenan saluton al la junaj pilgrimantoj el la tuta mondo en ĉi tiu tago de universala frateco, kiu vidas nin unuigitaj kiel filoj de unu sama Patro en la nomo de Kristo, vero de la homo."
Tiun sciigon mi ĉerpis el la informilo: ÖKESFO" (Ekumena E-Forumo), dec. 1991. Poŝtmarkoj pri papoj kaj aparte pri Johano Paûlo abundas, same kiel stampoj pri liaj vojaĝoj.

Pri Tao Xingzhi

Li naskiĝis 18-an de oktobro 1881 en Shexian-gubernio de Anhui-provinco, mortis 25-an de julio 1946 en Ŝanhajo. Fama ĉina edukisto, estimata kaj laûdata de la ĉina popolo. Eduka Teorio de li fondita ankoraû hodiaû montriĝas taûga kaj utila por la ĉina socio. Fon-

dinto de multaj novtipaj lernejoj, i.a. de la Socia Universitato en Chongqing. En 1946 ĝi estis la forĝejo por la nuna ĉina E-movado. Hu Juzhi estis lia plej proksima amiko kaj multaj ĉinaj E-istoj studis ĉe Tao, i.a. ankaŭ nia Ĉin Kajĝi kaj Zeng Heyao, vicprezidanto de la Pekina E-Asocio.
Fonto: Letero de ĈKG de 1991.12.15 al mi. (stampo kaj pm pri li vd. sub ĉinaj stampoj (91-51) en tiu LVL).

Fama sovetia E-isto Nikolao Kuznecov

Nia estimata kluba amiko Leo Vulfoviĉ el Moskvo sciigis, ke en oktobro 1991 aperis nova tutaĵkoverto kun nominalo de 7 kopekoj pri la "Heroo de Sovetunio": Kuznecov. Temas pri la jam tria koverto memore al Kuznecov. Krome en la jaro 1966 aperis pm pri li.



Volfoviĉ memorigis, ke Kuznecov perfekte regis la germanan lingvon, dank al Esperanto, helpe de germanaj inĝenieroj en Jekaterinburg (Swerdlowsk), kiuj tie fine de la 20-aj jaroj konstruis uzinon. Mortigis lin hazarde ukrainiaj partizanoj jam post la liberigo de Ukrainio. Kara Leo: Koran saluton al vi kaj dankon! Sukceson al vi en la fila-ekspo de Moskvc !

TUTAĴOJ

Queensland-a (Aŭstralio) tutaĵo kun privata E-a alpreso.

Nia Richard Hirsch daŭre "trafosas" aŭkciajn katalogojn kaj de tempo al tempo li trovas interesajn E-aĵojn, ĉu E-ajn tutaĵojn, ĉu E-ajn bildkartojn. Nun li trovis oferton pri Queensland-a tutaĵo kun E-a alpreso el la jaro 1913. "Qeensland" estis unu el la iamaj britaj kolonioj kaj situas en la nordoriento de Aŭstralio. La tutaĵo havas enpresitan 1 centan pm de Queensland. Krome estas algluita aŭstralia pm de duona Penny. La pm de la iamaj britaj kolonioj kaj de la iamaj aŭstraliaj tertorioj oni ne plu rajtis uzi post la 25 05 1913. La privata enpreso en Esperanto estas subskribita

de iu "J.P." el la urbo Laidley.
La aúkciisto deklaris ĝian minimuman prezon kun GM 800,-- (488 IRK!) Certe interesa trovaĵo kaj prave nia Hirsch rekomendas al ni ĉiuj, zorge trarigardi tiajn katalogojn por serĉi tiajn E-aĵojn. Ĉi-loke ankaŭ dankon al nia McKown pro informo pri E-aj bildkartoj, trovitaj en usona aúkcia katalogo.
(Pardonu, sed mi ne povas montri al vi la dorsflankon de la pk, ĉar mi nur posedas malbonan fotokopion.)

GLUMARKOJ

Sveda jarkongreso 1992

Nia Anna-Greta Strönne informis, ke aperis nova glumarko okaze de la jarkongreso de la Sveda Esperanto-Federacio en la urbeto Oskarsham en majo 1992. La verda gm montras bildon de malnova velŝipo por lignotransporto. La urbo situas en arboriĉa regiono kaj havas bonan havenon. Dankon pro la informo kaj salutojn!

47-a Kongreso de SAT-AMIKARO

Nia fidela André Sadier informis pri apero de porokaza gm okaze de la 47-a kongreso de SAT-AMIKARO, aprilo 1992, Bordeaux (Bordeozo). Folio de 16 (4x4) memgluueblaj gm kostas 7 (sep) FF + sendokostoj aú 2 IRK afrankite. Mendu ĉe SAT-AMIKARO, 67 Av. Gambetta, F-75020 Paris.

Franca propaganda gm

Sadier ankaú informis pri nedatumita propaganda gm, kiu aperis kaj haveblas afrankite kontraú 2 IRK ĉe supre nomita adreso. La

teksto enhavas vortludon pro preskaŭ sama prononcado de la vortoj: AUTRE kaj HAUTE. Supra teksto: "Alia ideo pri komunikado", kaj la malsupra: "Alta ideo pri komunikado".


Dankon al Sadier! Saluton al vi!

REVOJ KAJ SONĜOJ PRI ESPERANTUJOJ

(El "Kulturaj kajeroj" septembro/oktobro 1977)
Kunlabore verkis: Marcel Delcourt kaj Jean Amouroux.

* Esperanta Teritorio: A M I K E C O 1908 *

"Kara Sinjoro!...la ideo tre plaĉas al mi. Se ĝi estas plenumita, ĝi estus laŭ mia opinio tre grava akiro por la interna ideo de la esperantismo..." Tiel skribis, la 18-an de decembro 1907, d-ro Zamenhof al Gustave Roy en Saint Girons. Per tio li aprobis la ideon de G. Roy, realigi sendependan esperantistan ŝtaton



sur la teritorio de la neŭtrala Moresnet. Temis pri neŭtrala kvinkilometre longa kaj 1250 metre larĝa, inter Belgio kaj Germanio, proksime situanta al la urbo Aachen. Ĝia ĉefurbo estis Altenburg kun 3.000 enloĝantoj, inter ili, laŭdire, 135 E-istoj.

Jen do la idealaj kondiĉoj por fondi Esperanto-Landon. Sed la revo de G. Roy neniam traniris el la mondo de la sonĝoj. Ekzistas bildkarto kun la E-a alpreso: Amikejo (Esperanta Teritorio) Neutra Moresneto.

En tri anguloj de la pk vi vidas: maldekstre supre: la reĝino Wilhelmine de Nederlando, maldekstre malsupre: la belga reĝo Leopold kaj dekstre supre: la germanan reĝon: Imperiestro Wilhelm II. La pk montras la promenlokojn en la germana-nederlanda-belga kaj neŭtrala limregionoj.

Nova lando aperas sur la mapo de la Esperanto-Filatelo

****



La venezuela poŝto, por honori la 80-jariĝon de la Venezuela Esperanto-Asocio, uzis la subajn (estas diversa nur poŝtkodo) stampilojn, dum la lasta semajno de januaro 1992. Sendis: Prof. J.E. Bachrich. Adreso vd. en la UEA-Jarlibro 1992, paĝo 377.
Ĉiu koverto aŭ pk kun unu el la stampoj estas haveblaj ĉe VEA por 5 IRK aŭ US$ 2,--, kio inkluzivas la sendokostojn.



1060



1070



1010

Lastminute



Jen la bildo de la speciala stampo, kiun uzos la 44-a IFEF-Kongreso. La kongreso okazos de la 16-a de majo ĝis 22-a de majo 1992 en Münster (Vestfalio-Germanujo).

Detaloj ankoraŭ sekvos en la venonta LVL.

<u>Atentigo al la posedantoj de la granda katalogo de la E-filatelio, aŭ posedantoj de partoj de tiu katalogo.</u>

La suplemento 1992 ankoraŭ ne estas finpreta. La kaŭzoj estas:

1e la daŭra neklareco ĉe la ĉinaj stampoj.
Mi nun tamen finos tiun laboron, novajn informojn mi publikigos en la suplemento 1993.

2e mi devis fari multajn datdependajn (jarfino!) pormovadajn laborojn

(Hirsch)

L SP R NTO KOM N MO

Kiel vi vidas, sen UEA la Esperanto-komunumo estus apenaŭ rekonebla. Ĝi perdus multon. Eĉ sian sencon.

Per membriĝo en UEA aŭ ĝia junulara sekcio TEJO, vi aliĝas al tutmonda reto de pli ol 8 000 individuoj kaj 100 landaj kaj fakaj asocioj. Viaj estas:

La kontaktoj...
La Jarlibro de UEA kaj la Pasporta Servo de TEJO malfermas al vi mondon sen limoj.

La eldonaĵoj...
La plej kompleta Esperanta libroservo regalos vin en 1992 per sia renovigita katalogo de pli ol 3 000 libroj, kasedoj, vidbendoj kaj multe pli.

La kunlaboro...
La revuoj *Esperanto*, *TEJO-tutmonde* kaj *Kontakto* donas unike vastan perspektivon pri nia movado.
Jen ĉio por efike aktivi, inkluzive optimismon!

Ne manku al nia komunumo. Aliĝu al UEA.

Por aliĝi aŭ informiĝi pri membreco, kontaktu vian landan peranton (vidu la Jarlibron de UEA), aŭ skribu rekte al:

Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

MA Membro-Abonanto (ricevas la Jarlibron kaj la revuon *Esperanto*)
MA-T Juna Membro-Abonanto (ĝis 29 jaroj – ricevas ankaŭ la revuon *Kontakto*)
MJ Membro kun Jarlibro (ricevas la Jarlibron, sed ne la revuon)
MJ-T Juna Membro kun Jarlibro (ĝis 29 jaroj – ricevas ankaŭ la revuon *Kontakto*)
MG Membro kun Gvidlibro (minimuma kategorio)
DM Dumviva Membro (ricevas la Jarlibron kaj la revuon dum la tuta vivo)

Informilo de EFL-AREK (Esperanto-Ligo Filatelista Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj
Offizielles Organ der ArGe ESPERANTO im BdPh e.V.

Redakcio ĉe: Rudolf Burmeister, Max-Müller-Str.62
D-O-9051 Chemnitz
Prezidanto: Ivar Paulsson, Skytteholmsvägen 29
S-17144 Solna
Kasisto: Rolf Beau, Jacobstr. 9,
D-O-7010 Leipzig
Poŝtgirokonto:
Poŝtĝiro-Oficejo; Nürnberg, (bankkodo(BLZ)76010085)
Konto-No: 3667 37-855 (adreso de Beau)
Kotizo por 1992: DM 21,-- /13 IRK/13 US$
Stampobanko: Werner Heimlich, Fröbelstr. 4
D-W-3040 Soltau
Kompostis+ Richard Hirsch, Lambertstr. 12,
D-W-6430 Bad Hersfeld
Presasdo: Albert Oesterle, Hubertusstr. 28,
D-W-8853 Wemding



Leterportisto el la 19a jarcento sur glacio